

Kial Verda stelo kaj roza triangulo?

Mi hodiaŭ prezentos al vi la lastan verkon de Giorgio Silfer, “Prozisto kaj poeto, eseisto kaj dramverkisto, Florluda Majstro, ... nun la sola kandidato de la esperanta literaturo al la Nobel-premio” [p. 100], kiel oni memorigas al ni en la libro mem. Ĉi-foje temas pri cent-paĝa antologio de dek du aŭtoroj komponita de poeziaĵoj, prozaĵoj kaj eĉ unu teatraĵo. Jen la kompleta listo de la aŭtoroj: K. R. C. Sturmer, M. Stuttard, L. Tárkony, N. Rossi, U. Matthias, G. Berveling, U. Becker, B. Philippe, E. Zadlav, G. Silfer, S. Moinhos kaj P. Silas. Laŭ mi indas komenci ĉi tiun analizon per la plej eksteraj partoj de la libro mem: ĝiaj kovrilo kaj titolo. Fakte, legante la titolon (*Verda stelo kaj roza triangulo*) kaj vidante la kovrilon de ĉi tiu libro oni pensus, ke temas pri verko pri la persekutado de samseksemuloj dum la nazia periodo. Ĉar fakte ĝuste la roza triangulo estis la distingilo de tiu kategorio da persekutitoj ĉe la naziaj ekstermejoj. Sed tia supozo estus tute erara, ĉar la tuta libro enhavas eĉ ne unu mencion pri tiu temo. Ŝajnus do, ke laŭ la aŭtoro ĝuste ekstermejoj kaj iliaj simboloj estas la plej bona maniero por reprezenti samseksemecon (pardonu, “uranismon” kiel la aŭtoro preferas diri!). Sincere dirite, mi kredas, ke ĉi tiu elekto estas ne nur malbonstila kaj maltaŭga sed eĉ sufiĉe ofendiga. Estus multe pli simple, eble tro simple, uzi referencon al la ĉielark-koloroj, t.e. la koloroj de la flago de GLAT-movado¹. Sed bedaŭrinde oni preferis uzi ĝuste tiajn tristajn tonojn, eĉ ne menciante la siglon GLAT en la tuta verko.



**Emanuele
Regano**

Jama prezidanto de IEJ kaj nuna redaktoro de la jena revuo

Plie, oni decidis kunmeti verkojn pri samseksemeco kaj/aŭ de samseksemaj aŭtoroj, kaj malfacilas kompreni ĉi tian elekton. Kutime oni kolektas verkojn samtemajn, aŭ oni kolektas verkojn de aŭtoroj kun komunaj trajtoj, ekzemple nacieco aŭ lingvo. Male, ĉi tie oni starigas ne unu sed du sensencaĵojn: unue oni miksas du diversajn kriteriojn (sammaniere oni povus konsideri *Fiesta de Hemingway* ene de hispana antologio nur pro ĝia lokiĝo); due oni konsideras samseksemecon aŭ ambaŭseksemecon kvazaŭ konsiderindan kaj taŭgan

kriterion por dividi la homojn (sincere dirite, laŭ simila principo, mi atendas do antologion de aŭtoroj kiuj ŝatas blondul(in)ojn).

Sed ni venu finfine al la enhavo mem, post ĉi tiu longa kaj kritika enkonduko. Kiel antaŭdirite temas pri antologio sed la antologieco ne rilatas nur la kolektitajn verkojn sed ankaŭ iliajn komentojn kaj postparolojn. Jes ja, ŝajne ĉio reuzeblas kaj ĉi tie oni abunde reuzis pecojn de *Historio de*



↑ **Verda stelo kaj roza triangulo**, redaktita de Giorgio Silfer, Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop), La Chaux-de-Fonds, Svislando, 15,00€

esperanta literaturo, kaj de jam aperintaj intervjuoj aŭ recenzoj; sed ne timu ĉiuj materialoj “estas mendeblaj ĉe Kultura Centro Esperantista” [p. 109]. Kvankam mi tre aprezas ĉi tian ekologian emon al reuzado, mi sentas ke la fina rezulto estas sufiĉe mozaika kaj heterogena. Se certe kelkaj komentoj kaj postparoloj estas sufiĉe detalaj kaj bone enkadrigas la aŭtoron kaj la prezentitajn verkojn, aliflanke aliaj estas sufiĉe maltaŭgaj aŭ preskaŭ sensecaj tie kie oni metis ilin. Ekzemple recenzo de Carlo Minnaja (de 2016) al poeziaĵoj de Suso Moinhos longe pritraktas la gravecon kaj kompleksecon de la uzado de fiŝ-leksikono, sed ĉe la prezentataj poeziaĵoj tute ne ĉeestas tiaj elementoj. Plia ekzemplo estas la intervjuo (de 2006) de Ljubomir Trifonĉovski al Ulrich Becker kiu eĉ antaŭas unu el la du prezentitaj pecoj de la aŭtoro, do tute ne povas rilati al ĝi.

Sed mi ĉesu kritiki kaj oni alvenu al la fino per konkluda dolĉa noto. Krom la gravaj kaj fundaj difektoj de la antologio kaj ĉefe de la antologiigo, kiujn mi ĵus pritraktis, mi devas ĉiuokaze agnoski, ke la plejparto de la verkoj estas vere valoraj kaj tute legindaj. Tiu ĉi libro havas do almenaŭ la meriton plu konigi plaĉajn kaj valorajn aŭtorojn kaj verkojn. Certe la diskonigo de leginda literaturo estas unu el la celoj de bona antologio, tamen ne sufiĉas kolekti valorajn verkojn por starigi bonan antologion.

1. GLAT estas la E-siglo per kiu oni indikas: Gejojn, Lesbianojn, Ambaŭseksemulojn kaj Transseksemulojn. Tiu ĉi siglo estas fakte la traduko de la vaste konata formo LGBT+.